# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-32 sendita el Budapeŝto la 12an de aŭgusto

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# VEKI 2 sukcesanta; nova estraro por ILEI

Aliĝis al VEKI-2, la virtuala kongreso de ILEI, 156 personoj el 42 landoj. La 54-a ILEI-kongreso, kiu dua-foje okazas virtuale ofertas tre gravajn debatojn, interesajn prelegojn kaj plaĉajn koncertojn. Okaze de la 9-a de aŭgusto, la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj kaj Lingvoj, okazis granda debato kun pluraj podianoj altnivele kompetentaj pri tiu temo.

Ĉiuj programeroj aperos en la retejo de ILEI ĉe Youtube: Esperanto+Edukado ILEI. La Komitato de ILEI kunsidis dimanĉe la 8-an kaj marde la 10-an de aŭgusto kadre de la 54-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI. La kvorumo estis atingita kaj la Komitato estis decidpova. Okazis aprobo de la jarraporto. Ne povis okazi la voĉdonado pri la financoj. Pro tio okazos plia kunsido sabate la 14-an de aŭgusto. Pro tio la malnova Estraro ne povis esti senŝarĝigita.

Elektoj okazis. Elektiĝis kiel prezidanto Ahmad Reza MAMDUHI (IR), kiel sekretario Elena NADIKOVA (RU), kiel kasisto Karine ARAKELJAN (AM). Plie elektiĝis Laura BRAZZABENI, Alessandra MADELLA (ambaŭ IT), Radojica PETROVIC (RS) kaj Marija JERKOVIC (HR). Do la Ligo havas 8-personan Estraron por la tri sekvaj jaroj.

La Kongreso plu iras per AMO-seminario merkrede kaj universitata simpozio ĵaŭde kaj vendrede.

La prezidinto Mireille Grosjean
La prezidanto Ahmad Reza Mamduhi

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ilei

Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean



**ENHAVO**


- VEKI pluiras
- Nova estraro de ILEI
- UN komunikas
- Nova oficejo israela
- Insuloj de Rozoj

# EKO mesaĝas al la nova kaj ĝisnuna estraroj

Mi legis kun ĝojo la raporton de Mirejo kaj Ahmad pri la rezultoj de la elektoj. Potenciale bona estraro, kun emininte kapabla gvidanto. Mi bondeziras al la nova skipo kaj pretas aktive kunlabori kun ili; kun Ahmad kaj aliaj mi jam havas bonan kunlaboran rilaton!

La gratuloj estas dudirektaj: mi gratulas al Mirejo pro elstara gvidado de la Ligo tra naŭ jaroj depost 2013.  Ŝi agis sur mirinda gamo da terenoj, utiligante sian abundan sperton pro vojaĝado tra multaj landoj kaj kontaktado kun kulturoj kaj unuopuloj.

Mi gratulas vin pro la akcepto de estraro kun para nombro. Vi ja havas abundon da terenoj, kiuj bezonas atenton.  Praktike en la estraro apenaŭ iam ajn okazas voĉegaleco en decidoj. Facilas solvi tiun kazon, se leviĝus. En mondo de Zomo, pli granda estraro ne gravas finance.

Mi ripetas mian fortan deziron, ke en la nova estraro iu ricevu specifan respondecon pri la sekcia agado. Tie okazas amaso de la vera surloka laboro: 'ILEI apud vi'. Mi kiel respondeculo pri landa agado en UEA bezonas fortan partneron en ILEI.

TEJO havas brilan meĥanismon por faciligi transirojn - ĉe ili tio okazas ĉiujare! Mi ne sugestas, ke en ILEI la du estraroj havu komunan monaton, sed gravas la glata transiro. Certe Mirejo kaj Ahmad jam pensas pri tio. Precipe gravas pri la kasista fako. Karine fake kompetentas, sed sendube estas multaj detaloj kaj scioj, kiuj devas transiri pri la specifaj librotenaj praktikoj de la Ligo.

Resume, dankegojn al Mirejo, bondezirojn al Ahmad.

Stefan MacGill, prezidinto de ILEI 1992-94  kaj 2009-2013.

# Nova oficejo por esperantistoj

Post tri-jara serĉado, la 26.7.2021 (tute koincide la internacia tago de Esperanto, markanta la aperon de la Unua Libro en 1887) estis subskribita la kontrakto por la aĉeto de oficejo por E-Ligo en Israelo. La oficejo troviĝas en la nova oficeja turo Alon2 (finkonstruita 2017, aldonita bildo), en la komenrca koro de Tel-Avivo, 8 minuta promeno de la trajna stacidomo "Ŝalom" kaj kun abundo da trafikaj konektoj (buslinioj kaj estonte la sub-trajno) tuj apude.




La oficejo ebligos al ELI uzi la komunan kunvenejon por kursoj kaj ev-e por la kunvenoj de la Tel-Aviva E-klubo. Ĝi cetere estas bona investo: pro la pandemio la prezo pagita de ELI estas du trionoj de la prezo antaŭ la pandemio. La serĉadon kondukis la Kasisto Ŝlomo Ŝahar kaj A. Wandel,  kiuj ankaŭ subskribis la 135-paĝan kontrakton, kaj la aĉeton akonmpanis advokato Ram Modan, patro de nia membro Doron Modan. Dankon al ĉiuj kaj gratulojn al ELI!

En oktobro ELI planas modestan kunvenon por israelaj s-anoj, sed la *Israelan Kongreson* kaj la tradician ekskursan semajnon ni rezervas por la *printempo de 2022*. Tiam ni esperas gastigi vin ĉiujn, niaj fidelaj eksterlaj aliĝintoj, kaj aparte la

artistojn kiuj jam estas enprogramitaj, kiel Georgo kaj Sasa, Mikaelo Bronŝtejn kaj la "Ukraina Grupo".

Amri Wandel, estrarano de UEA.

# Novaĵletero el Novjorko

## Numero 53 – julio -aŭgusto 2021

- Demando al la Ĝenerala Sekretario: Multlingvismo kaj Unuiĝintaj Nacioj
- Tutmonda kurso kondukis hispanparolantojn al Esperanto
- Esperanto-tago kaj la Internacia Tago de Amikeco 2021
- Monda Esperanto-kongreso denove virtualas
- Junularo por lingvaj rajtoj okaze de KOVIM
- UEA gratulas la Ĝeneralan Sekretarion de UN okaze de ties re-elektiĝo

# Insulo de la Rozoj

La **Insulo de la Rozoj**, oficiale **Esperantista respubliko de la Insulo de la Rozoj** estis dum kelkaj semajnoj en 1968 mikronacio sur artefarita platformo en la Adriatiko, 11 km (6 marmejloj) for de la marbordo de la provinco Forli, Italio, kies **oficiala lingvo estis Esperanto.**
**https://eo.wikipedia.org/wiki/Insulo_de_la_Rozoj**

59 min / Filmo pri la historio de la libera teritorio de la INSULO DE LA ROZOJ
**https://www.youtube.com/watch?v=ci226cf1JOQ**

# Niaj tradiciaj melodioj – Amuze kaj Admira

https://youtu.be/uKLh5quIR0k

La korea Esperanto-koruso Amuze, kun la fama korea kantistino Amira Chun, gajnis la duan premion pro la Esperanta kanto "La lingvo por ni" en la talento-konkurso Mondovizio 2021, kiu okazis dum la 2-a Virtuala Kongreso de #Esperanto. "La lingvo por ni" estas populara kanto inter esperantistoj ĉe Esperanto-renkontiĝoj. La muziko venas de la skota popolkanto "Bring Back My Bonnie to Me". Gratulon al la ĉarmaj Amuze kaj Amira!

========= vortoj: 880 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.